PILO-PRESS

Internacia

Informservo

Pilo-Press

Jara abono

30,-- GM

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69



N-ro 43/77 - 2 nov 1977
Aperas ĉiusemajne

## Rimarkinda Renkontiĝo

Bazelo (pp) - En Bazelo disvolviĝis dum la semajnfino de la 15-a kaj 16-a de oktobro la programoriĉa Trilanda Renkontiĝo, kiu estis zorgeme aranĝita de la vigla Esperanto-Grupo de Bazelo. Fakte aliĝis 55 geesperantistoj el 8 landoj. Sabate aperis krome sep samideanoj sen aliĝo, ĉar al ili ne eblis ĉeesti dimanĉe. Sed jam vendrede kunvenis 12 esperantistoj, kiuj improvizis interkonan vesperon per manĝo kun "Raclette", skrapitaĵo de ekbruligita fromaĝo.

Sabate, en la stacidoma halo vidiĝis sagoj indikantaj al la Esperanta akceptejo. Tie, malantaŭ ornamita tablo, dejoris Erna Döring, la prezidantino de la Bazela Grupo; ŝi transdonis al la alvenintoj la renkontiĝajn insignojn, kuponojn k.s. Dume Anneliese Fiechter kaj Ana-Lisa Nicolodi atentigis la alvenantojn pri la akceptejo kaj helpis trovi la koncernajn hotelojn.

En salonego de la restoracio Rialto, proksime de la stacidomo, la prezidantino salutis la venintojn kaj malfermis la Renkontiĝon. S-ro Hugo Röllinger, bavaro el Bad Kissingen, bonkonata oratoro, montris bonajn lumbildojn kaj prelegis en modela Esperanto pri "Originoj de Kulturo". Ni mense saltis tra kelkaj jardekmiloj, dum kiuj evoluis kulturoj, kiel ekz. en Mezopotamio, Egiptio, Kreto, Grekujo kaj en aliaj kontinentoj. La preleganto intencis per tio vidigi al ni la konstantan ŝanĝiĝon, sed ankaŭ la reciprokan influon de diversaj kulturoj inter si.

Dum la paŭzo ni havis okazon admiri la belan foto-ekspozicion de la Naturamika Fotografa Grupo Basel. S-ino Carmela Aldegheri, kiu sin okupis pri tio, grupigis la bildojn laŭ diversaj Naturamikaj fakoj sur 10 tabuloj.

Post la komuna vespermanĝo en la sama ejo sekvis la amuza vespero kun "La Vagabondoj", kiuj per bonaj voĉoj kantis originalajn kaj tradukitajn kantojn kaj kiuj prezentis gajigajn skeĉojn. Ĉi tiu ensemblo konsistis el Andreo Bickel, Marie-Louise Münger, Albin kaj Pascale Tzaut, Camille Perrin, Eva Bickel kaj Louisette Gilomen. Ilia debuto bone impresis, kaj ni deziras al ili persiston kaj kuraĝon, ĉar komenco ĉiam estas malfacila. Danielle jam estas konata kiel muzikinstruistino. Per dekoj da arĉ- kaj blovinstrumentoj je ĉiaj grandecoj kaj per piano ŝi montris al ni sian mirigan lertecon. Ĉe ĉiu unuopa muzikilo ŝi ankaŭ rakontis travivaĵon.

Dimanĉmatene, post la vizito de vidindaĵoj en Bazelaj kvartaloj, lerte gvidata de Erna Döring, ree prelegis s-ro Hugo Röllinger, ankaŭ montrante lumbildojn, sub la temo "Orientaj Aspektoj de la Okcidento". Li parolis pri la estiĝo, disvastiĝo de Islamo, pri ties konkeroj ekde la sepa jarcento. "Ni vivas en lando arda pro suno, dume en la nordo ekzistas tre fekunda tero. Al ni apartenas tiu tero! Konkeru ĝin!" La ekspansio de Islamo fariĝis vastega; ĝi etendiĝis ĝis Afganio, al Mediteranea Afriko, ĝis Hispanio. Antaŭ pli ol mil jaroj ĝi ampleksis teritorion pli vastan ol tiu de la iama Romia Imperio. Estis granda avantaĝo, ke ĉie estis parolata la araba lingvo. Sed la araboj ne nur militis, ili ankaŭ ege influis la kulturon, la lingvon kaj skribon kaj sciencon. Cordoba,kiel sidejo de la kalifo, estis la kultura centro kaj havis lumigitajn stratojn, 300 bandomojn ktp. La araboj enkondukis en la okcidento la ciferojn el Hindujo kaj eĉ ties nulon, tiun gravan eltrovaĵon por la aritmetiko. Malgraŭ la rekonkero de la Pirenea duoninsulo fare

de la katolikaj reĝoj inter la dek-unua kaj dek-kvina jarcentoj multaj trajtoj de la Islama kulturo persistis. Kelkaj ekzemploj en la lumbildaro evidentiĝis tion. Ni vidis belan pentraĵon kun Mario, kie aŭreolo estis ornamita per Islama skribo. Eĉ la Dia Komedio de Dante havas Islamecajn trajtojn. En nia lingvo troviĝas neimageble multaj esprimoj kaj vortoj, kiuj devenas el la araba, ekz.: sofo, pantoflo, ŝalo, karafo, matraco, eliksiro, amuleto ktp. - Tio estas nur malmultaj eroj el la tre bona lumbildprelego de s-ro Röllinger, kiu rikoltis grandan aplaŭdon.

Fine, ni dankis al s-ino Erna Döring pro la sukcesa Trilanda Renkontiĝo kaj al ĉiuj kunhelpantoj. Ŝi, siaflanke, dankis al la ĉeestantoj pro la partopreno kaj al la kontribuintoj al la vigla programo.

En aparta salono ni ĝuis la komunan tagmanĝon. Poste ni kune vizitis la famkonatan bestarparkon. Ĉarma travivaĵo estis la nutrado de la fokoj, kiuj ludis kun la juna bredisto per pilkoj kaj aliaj iloj.

M. De Sassi

## Trilanda renkontiĝo en Heerlen

Heerlen (pp) - La aŭtuna trilanda renkontiĝo de 1977 okazis en Heerlen, Nederlando, dimanĉe, la 16-an de oktobro.

Partoprenis ĉirkaŭ 50 esperantistoj el Begujo, Germanujo kaj Nederlando. Ili ĝuis interesan programon, kiel prezentadon de diapozitivoj kaj rakonton pri Ruandio de samideano J. Jacob el Polleur, Belgujo, komunan manĝadon, viziton al kelkaj mezepokaj vidindaĵoj kaj al la nova moderna butik- kaj oficejcentro (promenado-strato) de Heerlen.

La bonega vetero kunhelpis por la agrabla sfero inter la partoprenintoj. La sekvanta, printempa renkontiĝo okazos en majo 1978, ie en la germana limregiono.

## Universitata prelegaro pri Esperanto

Berlin, GDR (pp) - Unuafoje en la historio de Germana Demokrata Respubliko universitato akceptis en sian oficialan instruplanon prelegserion pri "Planlingvoj". D-ro Detlev Blanke fariĝis ekde 1.9.1977 instrukomisiito ĉe Humboldt-Universitato en Berlin (GDR) kaj prelegas antaŭ 60 studentoj pri la temo "Planlingvoj en teorio kaj praktiko". La studentoj de germana kaj angla filologioj, inter ili 20 eksterlandaj el Soveta Unio, Pollando, Bulgario kaj Finnlando, aŭskultas serion de entute 15 prelegoj pri la diversaj aspektoj de la monda lingvo-problemo kaj ties solvebloj pere de planlingvo.

En la centro de la pritrakto troviĝas Esperanto (fontoj, strukturo, evoluo, komunikadaj potencoj, movado, objekto de lingvoscienco). La prelegaro estas deviga.

## Informoj de L. Giloteaux

Croix (pp) - Aperis dua, ĝisdatigita eldono de la franclingva poŝlibro "L'Espéranto" de prof. P. Janton, eldono de PUF, kolekto "Que sais-je?", n-ro 1511. La unua eldono de 1973 elĉerpiĝis.

De la 29-a de aprilo ĝis la 1-a de majo 1978, la t.n. Markola Kongreso arigos esperantistojn el Britio, Belgio, Francio kaj aliaj landoj, en la brita marurbo Folkestone. Kunvenejo: Southcliff Hotel, The Leas, Folkestone.

Multaj estis la temoj dum la fervojista Esperanto-renkontiĝo en la kastelo Zellaer, Belgio de la 24-a ĝis 25-a de septembro. Renkontiĝis ĉ. 90 fervojistoj kaj gastoj el 7 nacioj. Salutis multaj respondeculoj, la urbestro de Bonheiden, sindikatanoj ktp. Oni anoncis i.a., ke la kongreso de Belga Esperanto Federacio havos lokon venontjare en la urbo Charleroi. Dum la distra vespero kantis Ramona van Dalsen.

Reagoj - opinioj      Letero el Finnlando

Kuopio, la 23-an de oktobro 1977

Tre estimataj samideanoj,

Ankaŭ en Finlando la ĵurnaloj superabunde raportas pri la teruraĵoj, kiujn la teroristoj kulpas en via lando. Tamen estas grava kaj serioza mistendenco pritrakti en la okcidenta gazetaro nur negativaĵojn kaj skandalojn, murdojn kaj sensaciojn anstataŭ analizi kaj prezenti pozitivajn evoluojn kaj strebadojn.

Ni menciu tre tipan ekzemplon el nia propra lando: en 1972 ni havis en Kuopio tre elstaran SAT-kongreson kun ĉ. 350 partoprenantoj kaj la ĉefa ĵurnalo de Finlando Helsingin Sanomat dediĉis al la evento ĉ. sesonan paĝon. Aŭtune 1972 okazis en Kuopio, en taverno, proĵaluza drameto, en kiu viro pafis al sia antaŭa edzino (kiu tamen nur vundiĝis) kaj pafmortigis sin mem: la sama prestiĝa Helsingin Sanomat kun pli ol 300.000 abonantoj dediĉis duonan paĝon al tiu stultega "dramego"...

Verŝajne la celo de la teroristoj estas plenigi la konscion de la civitanoj per "nenio". La televido, radio kaj gazetaro disĵetas ĉiusekunde, ĉiuloke la informan lavangon en ĉies cerbon tiel ke la homoj malgraŭ la vera libereco de la menso, estas same stultigitaj kiel dum la tempo de la totala mensogo de Goebbels. Baldaŭ la homoj, teruritaj de histerio, estas pretaj akcepti ĉian ajn polican komandon sur sian nukon.

La okcident-germana socio devus fari ankaŭ introspekton kaj ne nur ŝveli en la koto de ekonomia prospero. La sent-emaj studentoj siatempe protestis kontraŭ Vjetnama milito: ĉu la socio komprenis? Eble la usonaj soldatoj estas bezonataj en FRG? Ne, FRG kapablas mem defendi sian teritorion, certe! La usona soldataro nur melhelpas la justan memrespekton. Kaj la establiteco en la universitatoj: pli nepenetreblan muron por novaj ideoj ne formas eĉ la Ĉina muro! En nia Esperanta afero tio estas pli ol evidenta simptomo. La laste-menciita validas ankaŭ por Finlando.

Kun kondolencoj kaj bedaŭroj

S.P. Hurtta
PL 221, SF-70101 Kuopio, Finnlando

Noto de la redakcio: Pri Leteroj de legantoj ne respondecas la redakcio de Pilo-Press. Ili redonas la opinion de la skribintoj!

Post la Wim Toelke-elsendaĵo petis unu lernanto de mi materialon pri Esperanto. Multaj aliaj menciis ĝin al mi kaj laŭdis ĝin. Plej multaj pensis pri latina lingvo, nur kelkaj pensis pri Esperanto.

Dr. J. Kondor, Neuwied

********************

Dan-Sveda Esperanto-Tago 1977

Helsingborg (pp) - La Dan-Svedan Esperanto-Tagon komence de septembro ĉeestis ĉ. 70 geesperantistoj, kiuj ĝuis la belan veteron kaj la amikan kunestadon.

La partoprenantojn salutis en favoraj vortoj por Esperanto la prezidanto de la urba konsilantaro de Helsingborg, Arne Larsson. Okazis aŭtobusekskurso.

La venonta loko por la Dan-Sveda Esperanto-Tago estos Nestved en Danlando.


Sveda Esperanto-Federacio eldonis 50 000 ekzemplerojn de Esperanto-Nytt.

25 klubanoj de Esperantista Klubo Malmö ĉeestis prelegon pri kantado de aŭstraliaj birdoj fare de S-ro W. Chandler, prezidanto de la Ornitologia Rondo Esperantlingva el Naremburn, Aŭstralio.

## Salutojn el Sommerhausen

Sommerhausen, malgranda loko proksime al Würzburg, Bavario, estas konata pro malgranda, ĉarma teatro en malnova konstruaĵo, en pordega turo. Laŭ invito de d-ro Heil, direktoro de Fremdultrafika Oficejo en Wiesbaden, d-ro J. Kondor kaj lia filino Bernadette ĉeestis prezentadon de teatraĵo en tiu miniatura teatro, premieron de "Eis" (Glacio) de Michael Cristofer. Reĝisoro estas Veit Relin, edzo de la konata filmaktorino Maria Schell, vidu la foton!

De la premiero d-ro Kondor sendis al ni salutkarton en Esperanto, kun subskriboj de konataj personuloj:




Subskribis:

Dr. J. Kondor

Rosita Serrano, ĉilia kantistino

Dr. Heil, ŝia samlandano

Peter Neckermann

Anita Neckermann

Veit Relin, kiu skizis samtempe sian profilon! Veit Relin estas konata ankaŭ kiel pentristo!

D-ro Kondor uzis la okazon por informi pri Esperanto.

Li skribis en aparta letero: Post la prezento ni amike babiladis en bela restoracio ĝis la noktomezo. Mi sidis apud Rosita Serrano kaj s-ino Neckermann..Nur s-ro Neckermann estis skeptika rilate Esperanton; la aliaj, precipe s-ino Rosita Serrano trovis la ideon bonega kaj laŭdis ĝin. Ŝi eĉ promesis, ke okaze ŝi volonte kantos en nia gimnazio, favore al la leprulej, sen ia ajn propra gajno!...



## Esperanto en Radio

Radio Vatikana. En la pasintdimanĉa elsendo partoprenis patro Biedulski, el Pollando, IKUE-prezidanto.

Varsovio. Dum la pasinta semajno alvenis ĉe la Esperanto-Redakcio 54 korespondaĵoj. Entute alvenis 1977 ĝis nun ĉ. 4000, kompare kun 1976 tio signifas korespondan deficiton!- Okaze de sia restado en Pollando, prof. d-ro Neergaard, plantpatalogo kaj konata Esperantisto el Kopenhago, donis al la E-redakcio intervjuon. Li interese rakontis pri siaj profesiaj prelegoj.- La E-Ekspreso interese raportis pri la ĉi-jara Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) en Zagrebo.

Zagrebo raportis pri ricevitaj korespondaĵoj kaj periodaĵoj. Dankon pro mencio de Pilo-Press kaj EER!